

*Sukces'plenar jaron 2001*

  
juna  
amiko



INTERNACIA ESPERANTO-REVUO DE  
POR LERNEJANOJ KAJ KOMENCANTOJ

**ILEI**

DECEMBRO 2000

N-ro 4 (95)

## Pri la lingv'ajo kaj ortografio de juna amiko

Sen pied'notoj ni uzas nur la plej oftajn 1500 vort'radikojn. Tiuj ĉi vortoj aperis en: **Esperanto, Minimum szótár** (1995), kiu jam plene elĉerp'iĝis. Nun ili estas alir'eblaj ĉe Interreto, en la hejmpaĝo de Juna Amiko: <http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto>

**Krom-signoj**, kiuj helpas komenc'antojn:

**Divido-streko(-)** troviĝas inter la elementoj de vort'kun-metoj, kiam ne mankas fin'ajo, ekzemple: tablo-tuko, el-iri ...

**Vertikala strek'eto (')** signas mankon de fin'ajo: bild'karto, verd'iĝi ...

Kiam io helpas la rekonon, kiel ekzemple: tuttaga (tt) aŭ la vorto revenas en la sama artikolo aŭ kiam la vorto estas tre kon'ata jam por komencanto (esperantisto, patrino...) ni ne uzas kromsignon.

Vi ofte trovas komojn (,). Ankaŭ per tio ni deziras helpi komencantojn.

1. regul'aro de la ĝusta skribo.



**Sur la titol'paĝo:  
"Nur tri dezirojn"  
bildo de  
Virpi Pekkala,  
Finnlando**

## En la spirito de Zamenhof

Okaze de la Zamenhofa festo-tago – la 15-a de decembro – mi volas tuŝi nur unu solan aspekton.

Ne forgesu ke, sia-tempe, Zamenhof el-iris kun Esperanto ne por brili per sia lingva kapablo, sed por doni egalan ŝancon al ĉiuj popoloj libere inter-kompren'iĝi. Li volis helpi.

Ni ankaŭ konsciu, kiel Zamenhof, ke la ekzisto de komuna lingvo per si mem ne for-igas ĉiujn mal-just'ajojn de la mondo, ne ĉes'igas mal-sanojn, mizeron kaj mal-saton. Milionoj da sen-kulpaj homoj, plejparte infanoj, mortas ĉiu-jare pro mal-riĉeco, kaj tio estas honto por ni ĉiuj.

Mi konscias ankaŭ pri tio, ke helpi per vortoj ne multe valoras. Estas necese helpi per agoj. Helpi al iu individuo, al infano, ekzemple, kiu mal-satas, kiu vivas mizere en profunda malriĉeco. Vi scias, ke grandaj amasoj vivas mizere en Afriko, Azio kaj en aliaj kontinentoj.

Vid'ante tion kaj dezir'ante almenaŭ modeste helpi, en marto de 2001, ni volos iniciati<sup>1</sup> novan mov'adon por la leg'antoj de nia revuo. Mi petas vin legi nian al-vokon kaj helpi laŭ viaj fortoj kaj kapabloj.


Ĝis tiam kun el-koraj salutoj:

**Geza Kurucz**  
redaktoro

1. komenci ion novan, kion antaŭe ni ne faris.



## decembra festo en Norda Eŭropo



Ekde oktobro la lumo pli kaj pli mankas al la nord'anoj. La suno apenaŭ vid'iĝas. Per sia mal-hel'iga flug'ilo la nokto kovras pli kaj pli grandan parton de la norda hemisfero<sup>1</sup>. Ne plu kreskas herboj, putras<sup>2</sup> folioj, la tero estas nigra, kota<sup>3</sup> aŭ glacie gli'tiga. Ni ĉiuj atendas la neĝon, kiu iom hel'igas la griz'econ de la tagoj, kvankam en la urboj la neĝo rapide mal-pur'iĝas kaj degelas<sup>4</sup>.

De post novembro en fenestroj brilas elektraj stel'egoj kaj kandel'aroj<sup>5</sup>. Ni atendas la plej gravan feston de la jaro, la 24-an de decembro. Infanoj sur-mur'igas adventan<sup>6</sup> kalendaron, kie ili povas mal-fermi klapon<sup>7</sup> kaj trovi sub ĝi en kav'eto belan bild'eton aŭ simblan<sup>8</sup> donac'eton aŭ bombonon<sup>9</sup>. Ĉu vi jam divenis, ke temas pri Krist'nasko? Jes, vi pravas, sed nia-lande — kaj en Skandinavio<sup>10</sup> ĝenerale — la festo nom'iĝas JOULU, JUL, angle YULE [jule], kaj pluraj el la julaj festo-kutimoj devenas de antaŭ Kristo. Tial kelkaj esperantistoj preferas la vorton *Julo*.

En la lernejoj oni komencas kanti specialajn jul'kantojn, verki kaj ludi julajn teatr'aĵ'etojn. Preskaŭ sen-escepte la ge-lernantoj prezentas ankaŭ la naskiĝon de Jesuo. Tiel nom'ataj Steloknaboj kantas en malnova dialekto<sup>11</sup> kaj laŭ tradicia melodio pri la tri Magoj<sup>11</sup>, reĝo Herodoto kaj la buĉ'ado de vir'beboj<sup>13</sup>. En ne-religiaj program'eroj ludas help'emaj kaj amuzaj koboldoj<sup>14</sup> (iuj esperantistoj nomas ilin nanoj), ĉifonaj amuzaj troloj<sup>15</sup>, parol'antaj bestoj kaj birdoj, neĝo-feinoj<sup>16</sup>. La plej grava rolo estas tiu de la Mistera<sup>17</sup> Donac'port'anto, kiun oni ali'loke nomas Pere Noël, Santa, Nikolao, Frosta Avo, Sinter Klaas, sed ĉe ni li nomiĝas Joulupukki (Jul'boko<sup>18</sup>), ĉar antaŭ-long'ege la donacojn al-portis ĝuste boko. Dum mia infan'eco la Donacportanto kun sia grand'ega koboldo-familio loĝis ĉe la Orel'monto en Laponio<sup>19</sup>, sed nun kelkaj homoj disputas<sup>20</sup> pri tio kaj deziras uzi lin kiel log'ilon por interesi turistojn. Ĉia-okaze, la finna poŝto scias lian adreson, kaj el la tuta mondo ven'adas leteroj al li. Finnaj esperantistoj ofte nomas lin Jul-Avo, Julĉjo aŭ Jul-Paĉjo.



↑  
Jul-Avo  
sur boko

Boko el  
pajlo →

Koboldoj  
ĉirkaŭ  
neĝohomo  
↓



Ne nur la lernejo, kiel tuto, havas jul'feston antaŭ la jar'finaj ferioj, sed ĉiu klaso volas ludi kaj kanti en sia propra jul'eto. Kaj en infan'ĝardenoj la et'uloj same ludas. Ankaŭ multaj ofic'ejoj kaj firmaoj<sup>21</sup> aranĝas por siaj labor'antoj juleton, kutime en restoracio<sup>22</sup>, kun bonaj manĝ'ajoj kaj trink'ajoj, danc'muziko kaj kun-kantado. Eĉ en mal-san'ul'ejoj oni celebratas<sup>23</sup> laŭ siaj kapabloj. En preĝ'ejoj la paroŝ'anoj<sup>24</sup> ar'iĝas por kune kanti la plej belajn julkantojn kaj himnojn. La televido ĉiu-tage el-sendas novajn kaj malnovajn infan'programerojn pri la fabela Julo.

La 24-an de decembro la vend'ejoj fermiĝas post tag'mezo kaj la trafiko haltas vespere. Oni prenas banon, vestas sin per puraj vest'ajoj. Hejme ni ornamas la tutan loĝ'ejon kaj precipe la fest-arbon (kiu ĉe ni estas piceo<sup>25</sup>) per koloraj vitraj steloj, tint'iloj, rubandoj, girlandoj, vitro-globoj, kandeloj, koboldaj statu'etoj, anĝeloj<sup>26</sup>, gratul'kartoj de amikoj kaj parencoj, hiacintoj, malgrandaj ruĝaj tulipoj, konusoj, arbo-branĉoj. Ĉiu familio havas sian guston kaj ĝiaj tradicioj kontribuas al la etoso<sup>27</sup>. En la kuir'ejo odoras laŭ-sezonaj manĝoj kaj spicoj: fiŝo, ŝinko<sup>28</sup>, napo, rizo-kaĉo, prunoj, cinamo, kariofilo (estas konfes'inde, ke ne ĉiu finno ŝatas ilin, sekve kuiras ion ne-tradician.) La vera Julo tamen naskiĝas en nia koro: bon'vol'emo, paco, donac'emo, amik'eco, trankvilo.

Vespere aŭd'iĝas frap'eg'ado kaj bruoj mal-antaŭ la pordo. En-venas la blankbarba Jul'avo kun baston'ego kaj la tradicia demando: *Ĉu troviĝas ĉi tie bonaj infanoj?* Nun-tempe, li plej ofte sur-havas ruĝan mal-dikan mantelon, ĉar la klimato<sup>29</sup> pli-varm'iĝis kaj la hejt'ado pli-bon'iĝis kaj

la brit-usona modo kaptis lin, sed antaŭe li surhavis pelton<sup>30</sup>, peltoĉapon kaj pelto-gantojn. Li, ja, venis per sledo<sup>31</sup> el la mal-varm'ega nordo. Li ŝercas, kant'igas kaj lud'igas la infanojn kaj petas ilin helpi en la dis-don'ado de la pak'etoj, ĉar li ne bone vidas la etikedojn<sup>32</sup>. Krak'et'adas<sup>33</sup> la belaj paperoj de la paketoj kaj aŭdiĝas kri'etoj de gajaj kaj veaj surprizoj.

**P**oste, la Julavo adiaŭas la familion amike kaj daŭr'igas sian vojaĝon al aliaj hejmoj. La infanoj ne plu diven'adas, ĉu la paketoj enhavas tion, kion ili deziris kaj pri kio ili, eble, eĉ skribis leteron aŭ flustris al la Julavo de iu vendejo. Ili

jam ludas.

Poste, ĉiuj, kiuj ne ankoraŭ ekdormis, pied'iras al la tomb'ejo por brul'igi kandelojn sur la tomboj de mort'intaj famili'anoj kaj ge-amikoj. La Krist'naska di'servo okazas nur la 25-an matene. La 26-a estas la tago de vizitoj kaj ekskurs'etoj, koncertoj kaj teatr'aj'etoj. Kaj, post mal-pli ol unu semajno, ni celebras kva-zaŭ novan Julon, nome la feston de la nova jaro, sen donacoj, sed tamen gaje. Krome, ĉu vi scias, ke en ortodoksaj<sup>34</sup> hejmoj Kristnasko venas nur en la nova jaro?

*Raita PYHÄLÄ, Finnlando*


1. duon'globo / 2. malrapide neniĝas pro manko de vivo-kondiĉoj / 3. duon'likva miks'ajo el tero kaj akvo / 4. neĝo fariĝas akvo / 5. kandelo: simpla blanka cilindro-forma malnova lum'ig'ilo / 6. advento: antaŭ-krist'naskaj semajnoj / 7. lev'ebla aŭ klin'ebla ferm'ilo / 8. ne-realan / 9. pecon de dolĉa frand'ajo / 10. Norvegio kaj Svedio / 11. lingv'ajo de malgranda regiono / 12. saĝ'uloj kiuj venis al la nov'nask'ita Jesuo / 13. suĉ'infanoj / 14. bon'intencaj fabelaj mal-altaj hom'etoj / 15. Skandinaviaj super-naturaj est'ajoj / 16. fabela estajo de mal-supera rango kun super-naturaj povoj / 17. en-hav'anta ion kaŝ'itan, sekretan / 18. boko: vir'besto; vidu la bildon sur paĝo 4 / 19. la plej norda regiono de Skandinavio / 20. akre diskutas / 21. komercaj entreprenoj / 22. publika manĝ'ejo / 23. publike kaj religi'ece plen'umas ceremonion / 24. paroĥo: eklezia distrikto / 25. speco de ĉiam-verda pinglo-arbo / 26. ĉielland'anoj / 27. ĝenerala humoro de la ĉeest'antoj / 28. femur'ajo de porko / 29. tuto de veteraj kondiĉoj de regiono / 30. super-vesto el bel'hara felo / 31. glit'vetur'ilo / 32. kart'eto sur objekto kun sur-skribo / 33. el-igias sekan bru'eton / 34. grek'rite krist'anaj.

## 10 ETAJ DIFERENCOJ

Vi vidas du Krist'naskajn ornam'ajojn por tablo. Ili ŝajnas esti identaj. Rigardu ilin atente kaj trovos, ke *10 detaloj diferencas.*

**Trovu ilin ĉiujn!**

Kie ili troviĝas?



En tiu ĉi rubriko vi trovas bildojn el la Esperanta literaturo heredaĵo per la plumo de nia fidela kunlaboranto, el-stara islanda poeto, **Baldur RAGNARSSON**. Konsciuj, ke sen bazaj scioj pri nia historio kaj literaturo oni ne povas fariĝi cel'konscia esperantisto, sukcesa pled'anto por nia nobla ideo. (Red.)

## 12 **Kálmán Kalocsay [Kaloĉai]**

**A**ntaŭ 33 jaroj, je la demando: “*Se la tuta originala<sup>2</sup> literaturo de Esperanto estus detru'enda, kaj vi rajtus savi unu solan titolon, kiun vi elektus?*”, la demand'ito, *Gaston Waringhien* (el-stara ese'isto<sup>3</sup> kaj ĉef-aŭtoro de PIV<sup>4</sup>), respondis per “*Streĉ'ita kordo*”<sup>5</sup> de *KALOCSAY*. Antaŭ 42 jaroj, *William AULD*, tiam jam fama poeto, skribis sur la titolan paĝon de ekzemplero<sup>6</sup> de la sama libro, donac'ita al mi: “*Jen la klara fonto!*”

De tiam pasis longa tempo kaj, tre eble, pliaj libroj nun meritustian komenton<sup>7</sup>. Feliĉe, la literaturo de Esperanto daŭr'igas sian vojon, novaj gravaj verkoj aperas, novaj talentaj<sup>8</sup> verk'istoj konstante kontribuas al la evoluo de nia literaturo. Tamen, ne nur la menciita poem'aro de Kalocsay, aper'intantaŭ preskaŭ sep jar'dekoj, sed ankaŭ lia tuta am-

pleksa<sup>9</sup> verk'aro, originala kaj traduk'ita, daŭre restas inter la

# BILDOJ EL LA HISTORIO

plej influ'riĉaj<sup>10</sup> atingoj sur la kampo de la Esperanta literaturo.

**K**álmán Kalocsay estis hungaro, medicin'isto<sup>11</sup>, ĉefkurac'isto en Budapeŝta hospitalo. Li kon'at'igis kun Esperanto en 1911 kaj debutis<sup>12</sup> kiel poeto<sup>13</sup> en 1921 per malgranda poemaro “*Mondo kaj koro*”. Ek-de tiam komencis funkcii<sup>14</sup> lia rolo kiel la ĉefa evolu'ig'anto de la Esperanta poezio<sup>15</sup>, ĝiaj vers'tekniko kaj esprimo-povoj, en la inter-militaj jaroj. Sed, efektive, la Kalocsaya fenomeno estas tiom-grada, ke oni prefere parolu pri roloj ol rolo. Unue, Kalocsay elstaris kiel



motoro de la grava revuo *Literatura Mondo*.

**L**a verk'aro de Kalocsay ampleksas 37 verkojn, 7 poeziajn originalojn, 19 tradukojn en libra formo kaj 11 lingvajn studojn. Kelkaj el tiuj verkoj estis far'ataj kun-labore kun aliaj, ekzemple kun sia amiko, G. Waringhien en la verkoj:

# LITERATURO DE LA ESPERANTA

originala lirikisto, kie pintas la jam menciita poem'libro, *Streĉita kordo* (1931). Due, li estis traduk'isto de artaj ĉef' verkoj: *La tragedio de l' homo* de la hungara poeto Madách [Madaĉ], de *Infero*<sup>16</sup> de Dante, de tri dramoj de Shakespeare, de poemoj de Baudelaire [Bodler], Heine kaj Petőfi [Petefi], por menci<sup>17</sup> la plej gravajn el la vasta kvanto de liaj traduk'ajoj. Kaj, trie, li eminentis ankaŭ sur la pri-lingva kampo, kie lia laboro kulminis<sup>18</sup> en la tria parto de la fama Plena Gramatiko de Esperanto. Krome, dum ĉiuj tri periodoj, li estis la

*Plena Gramatiko, La Floroj de l' Malbono* de Baudlaire kaj *Kantot kaj romancoj*<sup>19</sup> de Heine.

Kiel poeto Kalocsay estis admiranto de klasikaj modeloj kaj fiksitaj verso-formoj. Tion plej klare atestas lia vers'ita trakt'ajo<sup>20</sup> *La Arto Poetika* en *Kiel fariĝi poeto aŭ Parnasa*<sup>21</sup> *Gvid'libro* (1932, kun G. Waringhien). Li agnoskis<sup>22</sup>, ke li sentis sin fremda al la moderna poezio, “kiu parolas malpli al la intelekto<sup>23</sup> ol al aliaj sferoj<sup>24</sup>,” kiel li skribis al mi siatempe. Tamen, tio ne signifas, ke la originala poezio de Kalocsay estas manka je emociaj<sup>25</sup> tonoj.

Lia poemo *En amara*<sup>26</sup> horo estas, ekzemple, unu el la plej sinceraj kaj belaj poemoj en la lingvo. En tiu poemo la poeto korekte plendas pro ne-kompren'emo kaj manko de sub-teno fare de la ĝenerala esperantist'aro, li sentas sian sol'ecan pozicion<sup>27</sup>: *“Ho, kie estas la konsolo / Por mi – poeto sen popolo!”* Sed la lingvo mem, kiun li amas, lin savas:

*Ho, jen vi, Esperanto! Ne glora  
kaj fiera,  
Nur orfa, sen-potenca, sen-forta,  
sen-matura,  
Sven'ema*<sup>28</sup> *kaj sen-helpa kaj –  
eble – sen-espera,  
Sed nobla*<sup>29</sup>, *blanka, klara kaj  
sen-makule pura.*

Tra sia tuta vivo, kiel sin-dediĉa esperantisto, Kalocsay plen'umis siajn diversajn rolojn kaj kiel sen-laca kultiv'anto<sup>30</sup> de la Esperanta literaturo kaj instig'anto<sup>31</sup> al ties plu-port'antoj. Li direktis ĝian evoluon al ambiciaj<sup>32</sup> altoj kaj pli ol iu alia Esperanto-verkisto kreis fidon kaj konvinkon pri la kapabloj de la lingvo atingi plenan egal'rajton kun la grandaj literaturaj lingvoj.

Sen la unika<sup>33</sup> labor'ado de Kálmán Kalocsay nia literaturo supoz'eble ne havus tian kulturan statuson<sup>34</sup>, kian ĝi havas nun.

1. hav'ajo, ricev'ita post antaŭ-ulo(j) / 2. verk'ita rekte en Esperanto / 3. mallonga literatura verko pri grava temo por la publiko / 4. Plena Ilustr'ita Vort'aro / 5. son'fadeno de muzik'ilo / 6. ĉiu el la kopioj de libroj, gazetoj / 7. klar'igon / 8. grand'kapablaj / 9. ĉi tie: grand'nombra / 10. influi: grave efiki / 11. special'isto pri sano kaj kurac'ado / 12. unuan fojon aperis antaŭ publiko / 13. verkisto de poemoj / 14. agi, efiki / 15. arto pri poem'verk'ado / 16. la malo de ĉiellando / 17. diri pretere / 18. atingis la pinton / 19. romano: speco de poemoj / 20. stud' verko / 21. Parnaso: Monto en Helen'ujo, rest'ad'ejo de la Muzoj / 22. re-konis / 23. spirita kapablo de pens'ado / 24. kampoj, sur kiujn efikas ies ag'ado / 25. kor'tuŝaj / 26. mal-dolĉa / 27. maniero, en kiu sin trovas homo aŭ objekto en iu loko / 28. sveni: perdi la konscion / 29. morale alt'kvalita / 30. pri-labor'anto de kampo / 31. homo, kiu puŝas al agoj per vortoj ekscitaj / 32. ambicio: arda deziro al gloro, famo / 33. sen-ekzempla / 34. leĝan staton de io, iu.

### **Bukedo da proverboj, sukaj esprimoj el “Dom'fabriko” de K. Kalocsay kaj A. Csiszár**

*Nin ĉiam ravas, kion ni ne havas. / Blinde pafi – eble trafi.  
Neniu estas profeto en sia urbeto. / Kiu havas oron, havas honoron.  
Jen mia mano, samideano! (Sub-komprenu: Ni inter-konsentis.)  
for-iri kun mal-plenaj manoj (: mal-sukcesi)  
Ĝi estas por mi volapuk'ajo (: ... absolute nekomprenebla)  
pafi sin for (: subite mal-aperi) / fari ion tuŝe-fuŝe (: mise)*





## MULTIPLIKADO' PER FINGROJ

Antaŭ la apero de la nuntempaj kalkul'maŝinoj, kiel rimedo por facile kalkuli, la antikv'uloj<sup>2</sup> el-pensis manierojn solvi siajn kalkul'problemojn.

Unu el la rimedoj estis tiuj, kiuj uzis fingrojn. Kompren'eble, oni ne plu uzas tiujn kalkul'manierojn, ĉar ili ne kontent'igas la nun-tempajn bezonojn. Tamen, ni prezentas nun manieron por multiplikado, kiu uzas man'fingrojn kaj kiu povas esti instru'ata en lernejo dum leciono pri matematiko por entuziasm'igi gelernantojn.

Ĝi estas simpla kaj kurioza. Do, atentu, ge-amik'etoj, pri ĝiaj reguloj, ĉar vi mem povos instrui ĝin al viaj gepatroj kaj geavoj (ili ver'ŝajne ne konas tian multiplikadon).

Sciu, ke ĝi funkcias nur por ses-, sep-, ok- kaj naŭ-obl'igi. Necesas do, ke vi jam sciu multipliki de unu ĝis kvin.

1-a regulo: la ferm'ita mano signifas 5:



2-a regulo: de kvin oni kalkulas lev'ante sin-sekve ĉiun fingron.



ses



sep



ok



naŭ

Por ekzemplo, ni prezentas al vi  $7 \times 7$ .

La lev'itajn fingrojn oni sum'igas:

$2 + 2 = 4$  dekoj



x

Do,  $7 \times 7 = 49$

$3 \times 3 = 9$  unuoj

La mallevitajn fingrojn oni multiplikas.

Kaj nun, provu fari vi mem la ceterajn kazojn!

1. obl'ig'ado / 2. pra-temp'uloj.

Ĉu ekzistas unu-eca man'skribo por latin'alfabetaj lingvoj?

**N**i, verd'uloj, estas la plej klera popolo, ĉar fakte sen-analfabeta<sup>1</sup>. Tamen, malgraŭ komuna latina alfabeto, la man'skribo de diverslandaj esperantistoj grave diferencas. Tio devenas de la nacia skrib-maniero.

**S**ciu, ke ĉiu latin'alfabeta lingvo havas apartan manskriban tradicion kaj apartajn stilojn. En multaj landoj la por-infana elementa stilo lasta-tempe modern'igis, far'igis pli simpla. Tiu ĉi reformo restas interna afero de la nacia eduk'ado kaj ne trafas ekster-ulojn. Aperas la demando: Kiam ek-estos unueca stilo de latin'litera (kaj arab'cifera) manskribo adopt'enda<sup>2</sup> en elementaj<sup>3</sup> lernejoj?

**L**a nuna epoko postulas tian etalonon<sup>4</sup> por for-igi ĝenon kaj mis-komprenojn en senpera komunik'ado. Tajp'ilo<sup>5</sup> kaj komput'ilo ne povas sen-manke anstataŭi manskrib'adon, same kiel aŭtomobilo ne anstataŭas pied'ir'adon. Unu-iganta mondo devas unuec'igi ankaŭ elementan edukadon. Kaj la manskriba alfabeto, ĝiaj reguloj pri liter'far'ado kaj lig'ado devas esti identaj en ĉiuj lernejoj, kie oni instruas latinan kaj latindevenan alfabeton.

**E**ble, en la Konsilio de Eŭropo, en ties Graz-a Centro de Viv'antaj Lingvoj oni jam komparis divers'landajn elementajn manskribojn kaj aprobis Eŭropan etalonon, kiun en-konduki estos pli facile ol eŭron.

Valdo BANAJTIS, Litovio

<i>Aa</i>	<i>Bb</i>	<i>Cc</i>
Aa	Bb	Cc
<i>Dd</i>	<i>Ee</i>	<i>Ff</i>
Dd	Ee	Ff
<i>Gg</i>	<i>Hh</i>	<i>Ii</i>
Gg	Hh	Ii
<i>Jj</i>	<i>Kk</i>	<i>Ll</i>
Jj	Kk	Ll
<i>Mm</i>	<i>Nn</i>	<i>Oo</i>
Mm	Nn	Oo
<i>Pp</i>	<i>Qq</i>	<i>Rr</i>
Pp	Qq	Rr
<i>Ss</i>	<i>Tt</i>	<i>Uu</i>
Ss	Tt	Uu
<i>Vv</i>	<i>Ww</i>	<i>Xx</i>
Vv	Ww	Xx
<i>Yy</i>	<i>Zz</i>	
Yy	Zz	

1,2,3,4,5  
6,7,8,9,0

Ĉu via-landa alfabeto diferencas de la ĉi-apuda? Sendu al ni (adreso sur paĝo 27) vian manskriban alfabeton por prezenti ĝin en *Juna Amiko*! ►



## La Mir'inda Sorĉisto<sup>1</sup> de

# OZ

de L. Frank Baum

kun ilustraĵoj laŭ la originalaj<sup>2</sup>  
de W.W. Denslow

Tradukis H.R. Dreyer

El-don'ejo Bero, Berkeley, 2000



**C**erte multaj el vi konas ĉi tiun monde faman rakonton, verŝajne, ĉar vi vidis unu el ĝiaj multaj filmaj versioj<sup>3</sup>. Nun vi havas okazon koni per Esperanto la originalan skriban verkon. Dorotean ciklono<sup>4</sup> for-portas de siaj farm'bienaj hejmo kaj familio en Kansaso al la mirinda lando de Oz. Tie ŝi tuj, sed sen-intence, mort'igas la aĉan sorĉist'inon de oriento. Ŝi renkontas pajl'ulon<sup>5</sup> (birdo-tim'ig'ilon sen cerbo), stanar<sup>6</sup> ligno-hak'iston, al kiu mankas koro kaj leonon tro timeman. Ili decidas vojaĝi kune al la Smeralda<sup>7</sup> Urbo, kie loĝas la sorĉ-

isto Oz. Ili fidas, ke Li havas la kapablon doni al la pajlulo cerbon, al la stanulo koron kaj al la leono kuraĝon. Kaj Li montros al Dorotea kiel re-iri al Kansaso. Ili tra-pasas mal-facil'ajojn kaj aventurojn antaŭ ol al-veni. Baldaŭ ili sur-vojas denove al eĉ pli grandaj obstakloj<sup>8</sup>, ĉar Oz postulis, krome, la mortigon de la okcidenta sorĉistino. Sur-voje ili renkontas help'emajn musojn, mal-helpemajn arbojn, flug'antajn simiojn<sup>9</sup> unue malhelpajn, poste helpajn. Fine, ili mal-kovris la sekreton de Oz la granda kaj terura.

*Daŭrigo sur paĝo 13.*

1. ne-klera; ne-kon'anta la alfabeton / 2. adopti: al-propr'igi / 3. baz'gradaj / 4. ekzemplo-donan modelon / 5. skrib'maŝino.



*Gratulon<sup>1</sup> al Iitu Leinonen, kiu gajnis la unuan premion de la internacia Esperanta fabel'konkurso por infanoj en la kategorio de 11-12-jaraj infanoj. Jen ŝia verko.*



## Kato kaj Sciuro<sup>2</sup>

En iu fora regno vivis kato, kiu estis la hejm'besto de la reĝo. Ĝi estis tre bela. Ĝi havis longan, blankan pelt-aĵon, graciajn piedojn kaj belajn, verdajn okulojn. Ĝi estis bela, sed ĝia karaktero estis fiera kaj mem-ŝat'ema. Ĝi mal-estimis aliajn katojn kaj pri-zorgis, ke ili ek-vidu, kiel bela kaj nobela<sup>3</sup> ĝi estis.

Ĉiu-nokte ĝi el-iris kaj neniu alia kato sciis, kien ĝi iris. Ilia plej kutima temo estis prov-diven'adi la celon de la noktaj ekskursoj de la kato. Fine, en iu posttag'mezo ĉiu ek-sciis la veron.

Kiam la kato de la reĝo promen'adis en la korto de la kastelo<sup>4</sup>, ĝi ek-vidis sciuron kuri tra la korto. Sciuj, ke la kato ne toleris en-trud'ig'antojn<sup>5</sup> en sia korto, do, ĝi jetis sin al la sciuro. La sciuro grimpis en arbon.

– Kial vi tim'igis min? – kriis la kolera sciuro.

– Ne-invīt'itaj gastoj ne plaĉas al mi –, diris la kato kaj rigardis la sciuron kun perfida rigardo en siaj verdaj okuloj. – Mi kaptus vin, sed miaj ungoj mal-bon'iĝis – ĝi daŭrigis. – Kaj mi estas tiel bon'kondata, ke mi volas fari al vi nenion.

– Bonkondata! – diris la sciuro. – Se vi estus bonkondata, vi ne



irus nokte en la havenon por inter-bat'igi kun aliaj katoj.

– Kial vi scias? – la kato demandis surpriz'ita<sup>6</sup>.

– Mi vidis vin. Kaj mi vidis ankaŭ, ke vi serĉis manĝo-rest'aĵojn kaj ŝtelis fiŝojn.

– Ĉit –, la kato ekkriis kaj ĉirkaŭ-rigardis ek-time. Sed estis mal-frue. Du birdoj aŭdis la parolon de la sciuro kaj ili ek-iris dis-vast'igi la nov'aĵojn.

Baldaŭ ĉiuj katoj de la regno jam sciis pri la hejm'besto de la reĝo. Unuj ridis, aliaj mal-aprobis ĝian mal-reĝan konduton.

Kiam la kato komprenis, ke la birdoj ekiris disvastigi la novaĵojn, ĝi ruĝ'igis. Ĝi aliiĝis tute ruĝa. Ĝi hontis pro sia konduto kaj estis neniom fiera. La kato rimarkis, ke ankaŭ la okuloj iĝis ruĝaj kaj ili ne re-far'igis verdaj. Ĝi ne volis resti kun siaj ruĝaj okuloj en la lando, sed for-iris al alia regno.

La tempo pasis. La reĝo hav'igis al si novan hejmbeston kaj forĝesis la eks-hejmbeston. Kaj la eks-kato de la reĝo neniam re-venis. Ĝia karaktero ŝanĝ'igis; ĝi fariĝis afabla, ĝentila kaj help'ema. Ĝi havis idojn, kaj ankaŭ tiuj havis ruĝajn okulojn.

Se vi iam vidis katon, kiu havas ruĝajn okulojn, sciuj, ke ĝia prapatro estis la hejmbesto de la reĝo.



1. esprimo de ĝojo al iu pro ties sukceso / 2. vidu la apudan bildon / 3. nobelo: alt'rang'ulo laŭ de-veno / 4. bel'ega domo de riĉ'ulo / 5. trudi: kontraŭ-vole dev'igi / 6. frap'ita de ne-atend'ita ago

## Informoj pri la fabel'konkurso sur paĝo 27

**L**a libro en-havas plurajn mesaĝojn. Unu el ili estas ke, foje, ĉiu devas fronti obstaklojn, por ke aperu en ili novaj fortoj kaj ecoj. Vi legis en *Juna Amiko* (2/00, paĝo 10) rakonton kun simila mesaĝo.

Se vi estas et'ulo, vi ver'ŝajne ne povas legi mem ĉi tiun rakonton,

kvankam vi ĝuos rigardi la bildojn kaj aŭskulti ĝin.

Petu viajn gepatrojn aĉeti ĉi tiun libron, kaj insistu, ke vi iros trankvile al la lito nur se ili promesos legi al vi unu ĉapitron ĉiu-vespere.

Recenzis:

*Stefan, Karina kaj Hajnal MACGILL*

1. sorĉi: agi per super-natura forto / 2. ne pren'itaj de alia art'isto / 3. versio: vari'aĵo / 4. turno-vento / 5. pajlo: sekaj trunk'etoj de pan'herboj / 6. atano: arĝente blanka metalo / 7. smeraldo: grand'valora blu-verda ŝtono, ornam'aĵo / 8. mal-help'aĵoj / 9. bestojn, kiuj pleje similas al homoj.

# Pac'ama regimento

Komponisto: *Vesa Pölkki*

Teksto: *Anja Karkiainen*

Laŭ rakonto estas monto fore en la nord'  
kun kaverno<sup>1</sup> en interno kaj kun ligna pord'.  
Tie vivas kaj aktivas tre pac'ama gent'<sup>2</sup>,  
ruĝ'vest'ita, vigla, sprita regiment'<sup>3</sup>.

Mi mal-kovras: Jen manovras<sup>4</sup> Jul-kobold'popol'.  
Ĝin Jul-Avo en la kavo estras kun bon'vol'  
kaj kun saĝo pro la aĝo de jar'centoj kvin  
- iom plia ol de lia Jul-Avin'.

Dum la jaro kobold'aro en la granda hal'<sup>5</sup>  
labor'egas, kudras, segas aĵojn por regal'<sup>6</sup>.  
Por ke miloj da lud'iloj pretu antaŭ Jul'  
agas haste<sup>7</sup>, sen-prokraste ĉiu ul'.

Ĉu vi miras, kiel iras poste la eksped'<sup>8</sup>  
de donacoj? Per boacoj<sup>9</sup> kun malgranda sled'<sup>10</sup>!  
Ĉiuj bonas, do dis-donas Avo ĉion for.  
Ĉe la voj' ek-regas ĝoj' en ĉiu kor'!

Sled' mal-plenas dum re-venas kaj kobold' kaj best'.  
Tuj post tio ĉe abio<sup>11</sup> komenc'iĝas fest'.  
Ge-kobolda ar', la olda<sup>12</sup> Avo kaj Avin'  
manĝas ĝue, dancas brue ĝis jar'fin'.

1. mal-plen'ajo / 2. sam'de-vena hom'grupo / 3. aro de homoj, soldatoj / 4. lerte mov'iĝas / 5. ĉamb'ego / 6. regali: antaŭ-meti al gasto manĝ'ajon / 7. rapide / 8. for-sendo al adres'ito / 9. norda cervo / 10. glit'vetur'ilo / 11. speco de ĉiam-verda pinglo-arbo, Jul-arbo / 12. mal-juna.

*Rapide*

Laŭ ra - kon - to es - tas mon - to

fo - re en la nord' kun ka - ver - no en in - ter - no

kaj kun lig - na pord'. Ti - e vi - vas kaj ak - ti - vas

tre pac - am - a gent'. ruĝ - ves - ti - ta, vig - la spri - ta

re - gi - ment'.

©Vesa Pölkki & Anja Karkiainen

Ni gratulas al Inter-klaso, kiuj sub influo de nia al-voko ekkonkursis. Laŭnome: *E-klaso de la 5-a mezlernejo Darius ir Gireno* (24,5), Marijampole, LT; *E-grupo de bazlernejo Komlóstetői* (29,0), Miskolc, HU; *du E-grupoj de bazlernejoj Medvedgrad* (29,0), *Dragutin Domjanić* (30,0), Zagreb, HR.

Karaj konkursantoj de ĉiuj kategorioj, ni petas vin tuj reklamaci, se iu el la taskoj estis mis-korekt'ita aŭ miskalkulita. Adreso: *Juna Amiko, Hítel u. 10.fsz.16, H-6000 Kecskemét, Hungario* (<suli267@szeged.sulinet.hu>).

Se vi havas proponojn, informu nin laŭ la supra adreso. Dankon!

**Vi povas partopreni en la kvizo post ajna n-ro. Provu mezuri viajn sciojn lingvaj kaj kulturajn. Ne forgesu, ke solv'ante la task'etojn vi povas konsulti librojn kaj gazetojn.**

La regularo troviĝas en nia marta numero: 1/00 (92).

Kompletajn listojn vi trovas en nia hejm'paĝo. Vizitu ĝin, ni petas:

[www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto](http://www.banyai-kkt.sulinet.hu/esperanto)

## SOLVOJ de n-ro 3/00 (94)

Kolor'plena kruc'enigmo (p. 8)

O	R	F		K	O	R	P
K	U	R	B	O		I	R
	Ĝ	A	R	D	E	N	O
R	A	G	U	O		G	P
E		I	N		L	U	O
	F	L	A	V	A	J	N
O	R	A		E	R		O
L	A		U	R	Ĝ	A	S
	M	E	N	D	A	S	
	B	L	U	A		O	V

FAMAJ PONTOJ (p. 9):

1. Karola Ponto, *Prago, Ĉeĥio*
2. Nova Ponto, *Parizo, Francio*
3. Rialto, *Venecio, Italio*
4. Ora Pordego, *San-Francisko, Usono*
5. Tura Ponto, *Londono, Britio*
6. Malnova Ponto, *Mostar, Bosnio kaj Hercegovino*

**La plej lertaj solv'intoj de la septembra numero (Redaktis kaj korektis: Marija Belošević, Kroatio)**

**1-a kategorio:**

*Fruzsina Kiskartali* (gr): 29 p.  
(Hungario)

**2-a kategorio:**

*Samanta Čajić kaj tri aliaj*: 30 p.  
(Kroatio)

**3-a kategorio:**

*M. Molnár, M. Juhász*: 30 p.  
(Hungario)

**Post tri turniroj ĉe la pinto:**

**1-a kategorio:**

*Fruzsina Kiskartali, HU* (gr): 88 p.

**2-a kategorio:**

*Marija Mitevská, MK*: 80 p.

**3-a kategorio:**

*Maria Molnar, HU*: 89 p.

**Elkoran gratulon!**

- 1 Kion la fin'ajoj *-o, -a, -i* montras pri la vorto? (3 poentoj)  
Ilustru la konstatojn per iu radiko kun la supraj finaĵoj en fraz'etoj.
- 2 Skribu la numeralojn<sup>1</sup> 1.000.000, 1.000 kaj 0 per literoj! (3 poentoj)
- 3 Kion signifas la sekvaj mallong'igoj: *bv., il., PS* (3 poentoj)
- 4 Citu<sup>2</sup> la 9-an regulon el la 16 reguloj de Zamenhof. (3 poentoj)
- 5 Amiko demandas, kiujn esperantaj gazetoj vi ŝatas aŭ ŝatus legi. Respondu! (3 poentoj)
- 6 El-pensu du demandojn, kiujn vi povus meti en via unua letero al plum'amiko. (La demandoj komenciĝu per malsamaj vortoj.) (4 poentoj)
- 7 Kiuj el ili ne estas homoj: *blindulo, makulo, krimulo, spegulo, fremdulo, okulo* ? (2 poentoj)
- 8 Par'igu komencojn kun finoj: *Kiu demandas, tiu lokon ne ŝan -* (3 poentoj)  
*ĝu. Kiu tro rapide saltas, tiu ne eraras. Kiu bone sidas, tiu baldaŭ haltas.*
- 9 Desegnu aŭ pri-skribu ambaŭ simbolojn de Esperant(ism)o. (3 poentoj)
- 10 Nomu la ĉefurbojn de Togolando, Niĝerio kaj Aŭstralio. (3 poentoj)

La solvojn sendu al: *Raita Pyhälä, Jykyrintie 3, FI-69440 Lestijärvi, Finnlando*  
Ret'adreso: <[raitapy@jymy.kase.fi](mailto:raitapy@jymy.kase.fi)>

1. vortojn kun signifo de kvanto, ekz. 5, 27, 6.531 ... / 2. skribu aŭ diru laŭ-vorte.

### Solvoj de la antaŭa numero (n-ro 3)

1. Alian ne mallaŭdu, vin *mem ne aplaŭdu*.
2. Manifesto 2000
3. kapelo, lampo, kameno, kulpo, pan(e)o, peko, kepo, napo, mano, paku\* ...
4. *Mia vilaĝo estas eta kaj bela. En ĝi kreskas grandaj pomarboj. Tamen, mia franjo plej ŝatas manĝi oranĝojn kaj ĉerizojn.*
5. gaja: *bon'humora, ĝoja*, lampo: *lum'ig'ilo, reflektoro, lum'jet'ilo*, ruĝa: *sango-kolora, purpura*
6. kapeto, kapego, kapujo, trans-kap'igi, kap'vesto, en-kap'igi, kap-al-tere, kap'doloro, kap'turniĝo, grand'kap'ulo, hundo-kapa, lito-kapo, sen-kap'igi\*
7. gitaro, violono, piano, fluto, tamburo, drumo, cimbalo, harpo, ksilofono\*
8. Malnova Testamento.
9. En la nomo de la loka E-klubo mi invitas vin al la sabata Zamenhofa festo.\*
10. *Karlskoga, Montreal, Vraca, Chonan, Sankt-Peterburg, Güntersberge, Assisi, Rijeka, Veszprém, Hong Kong*

\* ekzistas ankaŭ alia(j) ĝusta(j) solvo(j).



# Esperanta BABIL'EJO

- Por kio estas Esperanto?
- Nu, por ion diri al...
- Kion diri al?
- Nu, paroli kun...
- Kun kiu paroli?
- Nu, babili, babili, babili, lasu min pace... babili.

(Esperanta ŝerco)

**P**ri tio, ke ekzistas virtualaj<sup>1</sup> babil'ejoj mi sciis de-longe, sed mi vidis rus'lingvajn studentajn<sup>2</sup> babilejojn – io koŝmara<sup>3</sup>! Temas pri konduto kaj lingv'ajo. Certe, mi konas la specialan komputilan ĵargonon<sup>4</sup> kaj la jun'ul'aran slangon<sup>5</sup>, sed legi tion de ekrano<sup>6</sup> – tio estas super miaj fortoj... Do, mia impres<sup>7</sup> pri babilejoj estis negativa.

Kiam mia franca amiko, Eriko invitis partopreni esperantistan babilejon <<http://lendir.karelia.ru/chat>>, mi estis ne tre entuziasma<sup>8</sup> pro la antaŭ-sperto. Iu-tage, mi tamen klakis<sup>9</sup> la adreson de la babilejo kaj... kaj tio tre ek-plaĉis al mi! Tiom, ke mi ofte aperas en la babilejo. Des pli, ke tien ofte “en-iras” miaj amikoj, kiujn mi konis antaŭe kaj, plej interese, aperas novaj amikoj!

La babilejo estas vere virtuala, jen vi estas kvazaŭ en ĉambro kun amikoj, jen la ĉambro estas la tuta Tero! Kio estas ankoraŭ al-tira – oni ne babilas pri io aĉa, ia idiotajo<sup>10</sup>, oni home konversacias<sup>11</sup>. Kaj la homoj estas jen el Francio, jen el Rusio, jen el Serbio, Aŭstralio, Japanio... Sed tio tute ne sent'iĝas! Kvazaŭ ni sidus en unu ĉambro kaj amike konversacius. Kio ankoraŭ povas al-tiri al Esperanto-babilejo, ke ne ĝenas, se oni estas tre modesta aŭ sin-ĝena. Certe, oni povas “konversacii” en iu nacia lingvo – da babilejoj multas, tamen en esperantista babilejo tuj vid'eblos ĉiuj avantaĝoj de la neŭtrala lingvo Esperanto: egal'eco, demokratio, tut'mond'eco.

Do, venu al Esperanto-babilejo kaj se vi konas aliajn – informu min!

Geĉjo *BASOV*, Rusio <[gbasov@hcei.tsc.ru](mailto:gbasov@hcei.tsc.ru)>

1. kvazaŭaj, imag'itaj / 2. studento: lernanto en supera lernejo / 3. tim'iga / 4. lingv'aĉon, kiu konsistas el pli-malpli kripl'ig'itaj vortoj / 5. apartan lingvon de sammetiistoj, de socia tavolo / 6. vid'ilo de komput'ilo, ekzemple / 7. forta influo al koro, spirito / 8. sin-done fervora / 9. premis butonon de komputila muso / 10. tute malsaĝa ago / 11. inter-parolas.

# LINGVA DOKTORO

H

## Vort'far'ado

Lern'ante Esperanto, en la unua tempo, mi estis kapt'ita de mir'inda vort'farado: **deriv'ado**<sup>1</sup> kaj **kun-met'ado** de vortoj. La regul'eco ebl'igas, kiel vi scias, fari el unu lern'ita vort'radiko dek, dudek eĉ pli da novaj vortoj sen lac'iga parker'ig'ado<sup>2</sup>. Diveni la signifon de nova kre'it'ajo, por mi ĉiam ankoraŭ, estas granda ĝuo. Tiom pli, ke por pluraj el ili, la gepatra lingvo ne havas apartan vorton. Mi prezentas, ĉi-foje, vortojn kun la radiko '**lern**'. Mi petas vin (se vi havas emon) konstrui per ili frazetojn kaj sendi ilin al la redaktoro (paĝo 27). Ni premios la send'intojn de la plej trafaj kaj interesaj ekzemploj.

Ĉe vort'farado atentu **ne pri konformeco** al la gepatra lingvo, sed pri klara, logika vari'ado de vort'elementoj.

### Jen 90 vortoj el unu-sola radiko

lerneti, lernegi, lernil(ar)o, lernema, lernaĵo, lernejo, lernado, lernigi, (ne)lernebra, (ne)lernigebra, (ne)lerninda, lernenda, lernant(in)o, lernantaro, lernul(in)o;

eklerni, relerni, mislerni, antaŭlerni, tralerni, mallerni, kromlerni, gelern'antoj, telelerni, ellerni, allerni, kunlerni, sublerni, senlerneja;

(sam)lernejan(in)o, lernejeto, lernejero, lernejo, (eks)lernejestr(in)o, enlerneja, eksterlerneja, interlerneja, antaŭlerneja, postlerneja, superlerneja, apudlerneja, preterlerneja;

lernolibro, lernoĉambro, lernotablo, lernosako, lernofako, lernogrupejo, lernomaniero, lernolingvo, lernoprogramejo, lernokutimo, lernotempejo, lernodaŭro,

lernojaro, lernotago, lernohoro, lernopaŭzo, lernoknabo, lernipova, lernideva, lernatingi;

duonlerni, ŝajnlerni, kaŝlerni, dormlerni, satlerni, lingvolerni,

nado, bazlernejo, mezlernejo, altlernejo, faklernejo, metilernejo, kvazaŭlernejo, ĉeflernejo, vartolernejo, ĉeflernant(in)o, memlerninto.

### Kaj nun provu mem!

Kiom da senco-havaj vortoj vi povas esti per '**las**' aŭ '**nov**'?


Se vi povis krei pli ol 20 vortojn, sendu la liston al ni (vidu paĝon 27).

Geza KURUCZ

1. vort'farado per vort'etoj kiel ge-, eks-, mis-, -eg, -et, -aĉ, -um / 2. en-kap'igo.



# MIR'INDA NEGOCO<sup>1</sup>



*Ĝam, fama kler'ulo vojaĝis en boato<sup>2</sup> trans riveron. Li estis la sola pasaĝero.*

*Boatisto:* Sinjoro, ni bezonas longan tempon por atingi la kontraŭan bordon. Tial, ĉu ne pas'igi la tempon agrable babil'ante?

*Klerulo (rid'et'ante):* Kial ne?

*Boatisto:* Nia konversacio<sup>3</sup> estu per 'Demando kaj Respondo'.

*Klerulo:* Bone.

*Boatisto:* Por ke la ludo estu interesa, ni konsentu pri la kondiĉo, ke tiu, kiu ne respondas ĝuste, pagos. Mi estas mal-riĉa anal-fabeto<sup>4</sup>, dum vi estas riĉa, fama klerulo. Do, se mi malsukcesos respondi ĝuste, mi pagos al vi unu rupion<sup>5</sup>; male, se vi malsukcesos, vi pagos du rupiojn.

*Klerulo:* Tre bone. Do, unue, vi povas fari demandon.

*Boatisto:* Sinjoro! Kio estas la birdo, kiu havas cent flug'ilojn, flugas dum nokto kaj dormas dum tago?

*Klerulo (gratas<sup>6</sup> al si la kapon kaj cerb'um'adas dum longa tempo sen-sukcese... Fine li donas du rupiojn al la boatisto): Boatisto, mi ne scias, kio estas tio. Nu, diru al mi, kio estas tiu stranga birdo.*

*Boatisto (don'ante unu rupion al la klerulo): Sinjoro! Nek mi scias.*

*S-ino Sai SARANATH, Hindio*

1. komerca inter-konsento / 2. simpla akvo-vetur'ilo por kelkaj homoj, vidu la bildon / 3. inter-parolo / 4. homo, kiu scias nek legi, nek skribi; ne-instru'ita homo / 5. rupio: mono en Hindio / 6. frotas korpo-parton.

## Vizito en Kosovo

Nia kun-labor'anto *Bardhyl Selimi (Mezini)* el Tirano, Albanio, antaŭ ne-longe jam la duan fojon vizitis la post-militan (la milito okazis en la jaro 1999) naskiĝ'landon, Kosovon. Li kun-portis Esperanto-lerno-librojn por kelkaj bibliotekoj. Ankaŭ *Radio Gjakova (Ĝakova)* intervjuis lin pri Esperanto.

Li vizitis kelkajn familiojn, donacis al ili lerno-librojn por albanoj kaj rekomendis al ili studi nian lingvon. Jen unu el la familioj, kies ge-filoj promesis lerni Esperanton kaj nun ili, tre ver'ŝajne, korespondas kun nia kunlaboranto en la In-



Foto de *Bardhyl Selimi Mezini*

ternacia Lingvo. Sur la foto la gefiloj: *Shqiponja* (Ŝkiponja en la albana signifas aglino, 18-jara), *Krenarja* (signifas fier'ul'ino, 16-jara), *Flaka* (la flamo, 12-jara), *Besa* (la don'ita parolo, 9-jara) kaj *Flamur* (knabo, kies nomo signifas: la flago, 4-jara).

# KROATIO



ĉeflando de Esperantio en 2001

**Internacia kodo:** HR

Internacia

**telefonnumero:**

385

**Areo:** 56.538 km<sup>2</sup>

**Loĝ'ant'aro:**

4.784.265

**Ĉefurbo:** Zagreb

(930.550)

**Flago:** tri-kolora

(ruĝa-blanka-blua)

kun blazono en la

centro

**Himno:** Bela nia

patro-lando (Lijepa

naša Domovino)

**Ŝtat'formo:**

respubliko

**Lingvo:** kroata

**Alfabeto**<sup>1</sup>: latina (30

literoj, unu litero =

unu sono)

**Popolo** (laŭ la

popol'nomb'r'ado

1991): kroatoj –

78,1%, serboj –

12,2%, aliaj (italoj,

hungaroj, albanoj

k.a.) – 9,7%

**Mono:** HRK – kunao

(1 EUR = 7,62 HRK)

Certe, vi aŭdis pri pluraj kroataj sportistoj, kiuj gajnis en internaciaj konkursoj aŭ kiuj ludas en diversaj eŭropaj kluboj. Sed ĉu vi sciis, ke Kroatio estas la patro-lando de *kravato* kaj skrib'ilo “*penkala*”?

Se vi vizitos tiun ĉi landon, vi certe scios multe pli. Multaj diras, ke ĉi tie oni trovas tre *gast'aman popolon*, kies historia sorto ne ĉiam estis feliĉa, tamen la nunaj generacioj ĝuas la revon de siaj prauloj vivi en propra ŝtato.

Kroatio situas<sup>2</sup> ĉe la orienta flanko de la Adriatika maro. Najbaraj landoj: *Slovenio*, *Hungario*, *Jugoslavio* (*Vojvodino*, *Montenegro*), *Bosnio kaj Hercegovino* kaj, pere de la maro, *Italio*.

La ebena parto troviĝas en la norda kaj nord'orienta parto de la lando, ĉirkaŭ la riveroj *Danubo* (188 km), *Sava* (562 km), *Drava* (505 km). Ĉi tie oni okup'iĝas pri agrikulturo kaj best'bred'ado<sup>3</sup>. Tra ĉi tiu parto de Kroatio pasas gravaj aŭto-vojoj, kiuj ligas Mez-Eŭropon kun Sud-Eŭropo kaj Proksima Oriento.

En la meza parto troviĝas la plej granda mont'aro. La plej alta monto-pinto lev'iĝas en la montaro *Dinara* kaj temas pri la sam'noma pinto 1830 metrojn alta.

La Kroatan mar'bordon karakterizas bela natura, belaj plaĝoj<sup>4</sup>, multaj insuloj.

Se vi interes'iĝas pri la naturo, en tiu ĉi lando vi trovos paradizon<sup>5</sup> sur la tero: *sep natur'parkojn, milon da insuloj kaj insuletoj, sennombrajn valojn kaj kaŝ-itajn lokojn*, kie vi povas ĝui bel-eajn momentojn.

Sed vi povus ankaŭ esplori sekretojn de mez'epokaj kasteloj<sup>6</sup>. Ĝis la nunaj tagoj cirkulas<sup>7</sup> oni-diroj pri en-kastelaj mister'ajoj<sup>8</sup>.




Se vi estas am'anto de antikv-ajoj<sup>9</sup>, ankaŭ en tia okazo, Kroatio estas, por vi, ĝusta adreso. Vi povas komenci vian vojaĝon ĉe la plej orientaj limoj, ĉe la kolombino de Vuĉedol, ĉe la Danuba bordo, trans la iama Panonia maro ĝis la pra-homo en Krapina kaj, poste, daŭr'igi al la Istria duon'insulo kaj ĝui la Romian arenon<sup>10</sup>

en Pula, aŭ pli sude, en Split, la kelojn en la fama palaco<sup>11</sup> de imperi'estro Diokleciano.

Kroatio vi povas atingi aŭte, buse, trajne, ŝipe, aviadile, eĉ bicikle aŭ, se vi preferus, piede.

Ĉiu parto de Kroatio, ofte eĉ najbaraj vilaĝoj, havas tre specifajn<sup>12</sup> folklorajn<sup>13</sup> trajtojn kaj manĝo-kutimojn. En tiu ĉi lando vi trovos manifestaciojn<sup>14</sup> okaze de karnavalo<sup>15</sup>, dum someraj monatoj, ankaŭ karnavalon ĉe la maro.

Multaj kulturaj aranĝ'ajoj allogas ne nur ekster-landajn artistojn, sed ankaŭ internacian publikon. Ni menciuj nur kelkajn: *Somera Festivalo<sup>16</sup> en Dubrovnik, Internacia Infan'festivalo en Ŝibenik, Internacia Folkloro Festivalo, Pup'teatra Internacia Festivalo, Festivalo de anim'itaj filmoj*, ĉiuj en Zagrebo.



Desegnis: Samanta Čajić

Areno en Pula

## Komenco de Esperanto en Kroatio

La unuaj esperantistoj aperis en Kroatio jam en la jaro 1889. Komence de la 20-a jar'cento Zagreba taggazeto "Obzor" favore skribis pri Esperanto.

Fine de la jaro 1908 (la 28-an de decembro) en Zagrebo estis fond'ita *Societo de Kroataj Esperantistoj*. Post unu jaro aperis la unua lernolibro (aŭtoro: *Mavro Špicer*). Samjare, la 10-an de aprilo, aperis la Esperanto-gazeto "Kroata Esperantisto".

Kiam oni parolas pri la komencoj de Esperanto en Kroatio, oni devas menciigi la tradukon kaj el-donon de la



Popol'kostumo  
el Moslavina

romano "Trezoro de l' or'aj'isto", la esperant'ig'itan poem'kolekton de kroataj poetoj kaj la tradukon de la novelo "Ano de l' ring'ludo", kiun oni poste tradukis el Esperanto en la ĉinan.

Se vi deziras scii iom pli pri Kroatio kaj vi havas ret'al-iron, vizitu:

<http://www.htz.hr>

Ni esperas ke, se vi vizitos Kroation, en via koro ek-flamos amo por ĝi kaj, pro tio, vi certe iam revenos.

*Pied'notoj sur paĝo 25*

### KVIZO PRI KROATIO

Se vi volas gajni belajn prospektojn, broŝurojn pri Kroatio, sendu la solvojn de la suba kvizo al *Marija Beloŝević*, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb, Kroatio (rete: [mbelosev@public.srce.hr](mailto:mbelosev@public.srce.hr)) ĝis la fino de januaro 2001:

1. La ĉefurbo de Kroatio estas  
a) Split b) Pula c) Zagreb
2. Kiom da naturparkoj estas en Kroatio?  
a) 3 b) 7 c) 9
3. De-venas el Kroatio:  
a) ĉapelo b) kravato c) ombrelo
4. La aboco konsistas el literoj:  
a) 25 b) 28 c) 30
5. La najbaraj landoj de Kroatio:  
a) BkH, HU, IT, YU, SL  
b) AT, HU, IT c) AT, YU, SL
6. Kroatio lim'iĝas kun la maro:  
a) Nigra b) Adriatika c) Norda

## Iom pri la kroata lingvo

La kroata lingvo de-venas de la iama pra-slava lingvo, sekve ĝi apartenas al la slavaj lingvoj, al ties sud'slava branĉo.

Jen la alfabeto de la kroata lingvo:

a	b	c	č	ć	d	dž	đ	e	f	g	h	i	j	k
a	b	c	ĉ	ċ'	d	ĝ'	ĝ	e	f	g	h	i	j	k
l	lj	m	n	nj	o	p	r	s	š	t	u	v	z	ž
l	l'	m	n	n'	o	p	r	s	ŝ	t	u	v	z	ĵ

' : montras molan konsonanton. Akcento kiel en Esperanto.

Jen kelkaj utilaj esprimoj:

<i>Saluton!</i>	<i>Zdravo!</i>	<i>informejo</i>	<i>informacije</i>
<i>Ĝis reveno!</i>	<i>Do viĉenja!</i>	<i>policano</i>	<i>policajac</i>
<i>Mi (ne) komp- renas.</i>	<i>(Ne)Razumijem.</i>	<i>pano / akvo</i>	<i>kruh / voda</i>
<i>Mi petas.</i>	<i>Molim.</i>	<i>1 jedan</i>	<i>2 dva</i>
<i>Dankon!</i>	<i>Hvala!</i>	<i>3 tri</i>	<i>4 četiri</i>
<i>Jes / Ne</i>	<i>Da / Ne</i>	<i>5 pet</i>	<i>6 šest</i>
<i>Mi ne scias.</i>	<i>Ne znam.</i>	<i>7 sedam</i>	<i>8 osam</i>
<i>Pardonu!</i>	<i>Oprostite!</i>	<i>9 devet</i>	<i>10 deset</i>
<i>Mi ĝojas.</i>	<i>Radujem se.</i>	<i>20 dvadeset</i>	<i>50 pedeset</i>
		<i>100 sto</i>	<i>1000 tisuću</i>

Marija Belošević, Kroatio

1. aboco / 2. troviĝas / 3. bredi: eduki, kresk'igi bestojn por homa uz'ado / 4. bordo de maro, lago, rivero, taŭga por sun- aŭ akvo-banoj / 5. ĉiellandon; plej agrablana lokon / 6. bel'egaj dom'egoj / 7. rond'iras / 8. sekreto-plenaj okaz'int'ajoj / 9. antikva: mal-nov'ega / 10. lokon por bataloj aŭ ludoj / 11. luksa belega domo / 12. distinge proprajn / 13. popol'artajn / 14. amasajn publikajn sur-stratajn el-mont'adojn de opinio aŭ specifa kulturo / 15. tempon, dediĉ'itan al amuz'ajoj / 16. serio de prezentoj de sam'specaj art'verkoj.

## INTERKULTURO




**Hejm'paĝo:** <http://lps.uniroma3.it/kler>

Ĉiu Interklaso ekkontaktu siajn sam'ring'anojn kaj sendu kontribu'ajon ankaŭ al nia redakcio por prezenti ion al la legantoj.

La retadreso: [junaamiko@esperanto.nu](mailto:junaamiko@esperanto.nu) de du-tri monatoj ne funkcias pro ret'piratoj, sendu viajn kontribu'ajojn kaj mesaĝojn al: [suli267@szeged.sulinet.hu](mailto:suli267@szeged.sulinet.hu)





Familio veturis al mont'aro por ferii. En la staci'domo la patro de-metis amason da valizoj sur la teron, for-viŝis la ŝviton de sia vizaĝo kaj diris:  
 "Ni forgesis kun-preni la pianon<sup>1</sup>."

Panjo diris koler'ig'ite:  
 "Ne faru tiajn ŝercojn!"  
 "Kiaj ŝercoj? Sur la piano kuŝas niaj vojaĝ'biletoj!"

"Ho, mi diros al via instruisto, ke vi fumas!"

"Ne gravas. Mi ankoraŭ ne vizitas lernejon!"

"Kion mi vidas! Vi ja havas unu ŝuon brunan kaj unu nigran!"

"Jen vi miras, ĉu? Kaj imagu, hejme mi havas ankoraŭ unu tian saman paron."



## Abon'tarifoj de Juna Amiko por la jaro 2001

	EUR / USD	DEM	2-4 ekz.	Ekde 5	Aere
Tarifo 1	10,8	21	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 2	6	12	-33.3 %	-50 %	+20 %
Tarifo 3	4	8	-20 %	-30 %	+20 %
Hungario	600 HUF		po 420 HUF		—

Al la internacia fabel'konkurso de Päätalo-Instituto, Finnlando venis konkurs'ajoj el *Bulgario, Finnlando, Francio, Hungario, Jugoslavio, Kroatio, Rumanio*. La premiitoj ricevis siajn diplomojn en la fabel'tago, la 18-an de oktobro, en Hotelo de urbo Taivalkoski, Finnlando. Ĉeestis s-ro *Osmo BULLER*, direktoro de la Centra Oficejo de UEA. Jen la listo de la premiitoj. **Gratulon al ili ĉiuj!!!**

### **Kategorio A (6-8 jaruloj):**

- 1-a: *Hajnal MacGill, Hungario* — La du azenoj  
2-a: *Grupo el Chateauroux, Francio* — La arbohakisto Papilio  
3-a: *Niina Tauriainen, Finnlando* — Erinaco kiu estis ĉiam malgaja

### **Kategorio B (9-10 jaruloj):**

- 1-a: *Grupo el Chateauroux, Francio* — Sirosia  
2-a kaj premio "Napero Amikeco": *Stefani Strunjak, Kroatio* — Neĝ'reĝino  
3-a: *Kirsi Tauriainen, Finnlando* — Aventuro de muso en kuirejo

### **Kategorio C (11-12 jaruloj):**

- 1-a kaj "Napero Internacia": *Iitu Leinonen, Finnlando* — Kato kaj sciuro  
2-a: *Klaso 5 el Chateauroux, Francio* — La bav'ema princ'ino  
3-a: *Zlatko Đorđević, Serbio-Jugoslavio* — Stranga vojaĝo

## **juna amiko**

Internacia Esperanto-revuo de ILEI por lernejanaj kaj komencantoj

27-a jaro, n-ro 4 (95), 2000

Aperas 4 fojojn jare

Redaktoro: *Géza KURUCZ* (Hitel u.10.fszt.16, H-6000 Kecskemét, Hungario)

Retadreso: [junaamiko@esperanto.nu](mailto:junaamiko@esperanto.nu)

Vicredaktoro: *StefanMacGill* (retadreso: [stefan.macgill@galamb.net](mailto:stefan.macgill@galamb.net))

Abona adreso: Juna Amiko, Pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario

Eldonanto: ILEI, Stenbockensgata 102, SE-136 62 Haninge, Svedio

Lingva revizianto: *André Albault* (Francio)

Kunlaborantoj: *s-ino Raita Pyhäälä* (Finnlando), *Baldur Ragnarsson* (Islando), *Tatjana Auderskaja* (Ukrainio), *s-ino Jennifer Bishop* (Aŭstralio), *Zoran Ćirić* (Jugoslavio), *s-ino Saranath* (Hindio), *Gennadij Basov* (Rusio), *Bardhyi Selimi Mezin* (Albanio), *Tilli Dahienburg* (Germanio), *Dieter Berndt* (Germanio), *Marija Belošević* (Kroatio), *Pekim Tenorio Vaz* (Brazilo), *Evandro de Freitas* (Brazilo), *Zoltán Kurucz* (Hungario), *Bill Mak* (Ĉinio), *Michel Nkwirikiye* (Tanzanio), *Eugenia-Ecaterina Popoviciu* (Rumanio), *Mensah B. Attiogbe-Agbemadon* (Togolando), *José J.Campos Pacheco* (Kubo), *Anja Karklainen* (Finnlando)

Grafikistoj: *Irina Nagy* (Rumanio), *Monika Molnár* (Hungario), *Pavel Rak* (Ĉeĥio)

Komputila kolora tekniko: *János Bakk* (Hungario)

Farita en Presejo Saluton

Ĉinojn u.20, H-1045 BUDAPEST, Hungario

**ISSN 0230 1318**

Simboloj de Zagrebo  
(katedralo, blazono)  
Desegnita: Samanta Čalić

